

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

SEMAJNA

Internacia

Neŭtrala

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Fleletona red.: Zanoni.

ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekkonto Köln 70865,
por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
el ĉiuj landoj 4 germ. mk.,
po cm², ĉe grandaj aŭ
ripetataj anoncoj rabato.

**Ni ne tro esperu,
pli ni laboru!**
(Laŭ diro de D-ro Nitobé.)

Numero 80 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 16. Aprilo 1922.

La 14-a de Aprilo



Entombigo de la ĉerko de l' Majstro.
(El la memorlibreto „La Lastaj Tagoj de D-ro L. L. Zamenhof“.)

Ni laŭdu Lin!

D-ro Koloman de Kalocsay.

Memora fest', dolora fest'
Funebre ni solenas.
Ho, flugis for la flam' de l' kor',
Ni kiun larme benas.

Nek tondra son' nun de kanon'
Nek sonoriloj festas;
Nur batsonor' de nia kor'
Pri la solen' atestas.

En vasta mond' malgranda rond'
Ja estas nur la fratoj;
Sed kun potenc' en nia senc'
Kuniĝas korobatoj.

Ho batsonor' de nia kor'
Funebru la benatan,
De kies am' flagranta flam'
Kunfandis rondon fratan.

Estingis sin la flam' de l' sin':
Plu ĝia brul' ne hardas;
Sed staras jam fandaĵ' de l' am'
Kaj spite frostojn ardas.

Ĝin flegu ni, ardegu ĝi,
Ĝis el malgranda sfero
Post vintra frost' la Pentekost'
Alvenos al la tero, —

Ĝis falos jen la peza ĉen',
Nun kiu langojn jugas, —
Ĝis kun ĝojbril' flamlangoj mil
Tra l' tuta mond' disflugas, —

Ĝis en kompren', eterna ben'
Fratigos mondo tuta:
Ni laŭdu Lin, ke aŭdu nin
Homaro surde-muta!

Oni subvencias oficiale.

Finnlanda Registaro donas 50000 fmk. por la XIV-a. Urba Administracio de Düsseldorf subvencias Asocian Tagon de GLEA per 10000 gmk.

Laŭ informo ricevita de la Loka Kongresa Komitato ni komunikas la ĝojigan sciigon, ke la Registaro de Finnlando konsentis doni subvencion de 50000 finnaj markoj al la XIV-a Kongreso de Esperanto.

XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko-Helsingfors, Finnlando 8.—16. aŭgusto 1922.

Sepa Komunikilo.
1. La dato de la kongreso. Kaŭze de tio, ke la Finna Vaporŝipa Kompanio fiksas tute novan veturplanon por la venonta somero, la L. K. K. estis devigata ŝanĝi la daton de la Kongreso. La XIV-a Universala Kongreso okazos la 8.—16. de aŭgusto 1922.

2. Alveturo al Finnlando. Nuligante la sciigojn donitajn en la 19-a punkto de la II-a komunikilo kaj en la 2-a punkto de la V-a komunikilo, ĉi tie estas sciligataj la definitiva alveturplano de la „kongressipoj“ kaj parte novaj rimarkinde malaltigitaj prezoj.

Brita Imperio. El Hull ekveturos ŝipo „Arcturus“ jaŭdon, la 5. VIII., vespere, alvenonte al Helsinko lundon, la 7. VIII., matene. disponeblaj lokoj: I-a kl. 74, II-a klaso 21, III-a kl. 290. Prezoj: I-a kl. 11.4/—pund. sterl., II-a kl. 8.—/—pund. sterl., III-a kl. 4.16/—pund. sterl., ĉio kun manĝo kaj lito. „Arcturus“ faros la vojaĝon tra la Kiel-a Kanalo.

Danujo. El Kopenhago ekveturos ŝipo „Oihonna“ sabaton, la 5. VIII., je la 5-a posttagmeze, alvenonte al Helsinko lundon, la 7. VIII., tage. Lokoj: I-a kl. 85, II-a kl. 24, III-a kl. 8. Prezoj: I-a kl. 128.— dan. kr., II-a kl. 112.— dan. kr., III-a kl. 56.— dan. kr., ĉio kun manĝo kaj lito.

Germanujo. El Stettin ekveturos ŝipo „Ariadne“ merkredon, la 2. VIII., je la 1-a tage, alvenonte al Helsinko vendredon, la 4. VIII., tage. Lokoj: I-a kl. 182, II-a kl. 74, III-a kl. 12. Prezoj: I-a kl. 720.— fmk., II-a kl. 640.— fmk., ambaŭ kun lito kaj manĝo, III-a kl. 280.— fmk. kun lito sed sen manĝo. Manĝon oni povas ricevi por 50.— fmk. potaĝe.

El Stettin ekveturos ankaŭ ŝipo „Rügen“ sabaton, la 5. VIII., je la 4-a ptm. alvenonte al Helsinko lundon, la 7. VIII., matene. Lokoj: I-a kl. 208, III-a kl. 35 (dua klaso ne ekzistas). Prezoj precize sciligataj en venonta komunikilo, sed estos verŝajne la samaj kiel en „Ariadne“.

El Lübeck ekveturos ŝipo „Mira“ sabaton, la 5. VIII., je la 2-a ptm., alvenonte al Helsinko mardon, la 8. VIII., frumatene. Lokoj: I-a kl. 16, III-a kl. 18. Prezoj: I-a kl. 640.— fmk. kun lito kaj manĝo, III-a kl. 280.— fmk. kun lito sed sen manĝo.

Car evidente tra Lübeck, pro la tie okazonta antaŭkongreso, alveturos pli granda aro da samideanoj, la ordinara ŝipo de tiu linio ne estos sufiĉe granda. Pro tio la L. K. K. klopodos lui apartan ŝipon por Lübeck, pri kio poste estos pli precize sciligata.

Svedujo. El Stockholm — al Helsinko — ekveturos ŝipo „Torneå“ merkredon, la 2. VIII., je la 7-a vesp., alvenonte jaŭdon, la 5. VIII., vespere. Lokoj: I-a kl. 55, II-a kl. 35, III-a kl. (sen kajuro) 150. Prezoj: I-a kl. 88.— sved. kr., II-a kl. 72. sved. kr., III-a kl. 48.— sved. kr. Ĉio sen manĝo.

El Stockholm — ankaŭ al Helsinko — ekveturos ŝipo „Birger Jarl“ dimanĉon, la 6. VIII., je la 7-a vespere, alvenonte lundon, la 7. VIII., vespere. Nombro de lokoj kaj prezoj la samaj kiel en Torneå.

El Stockholm — al Turku-Åbo — ekveturos ŝipo „Nordstjernan“ ĉiumarde, „Helmdall“ ĉiujarde kaj „Hebe“ ĉiusabate je la 7-a vesp., alvenonte al Turku-Åbo la sekvantan matenon. Lokoj: I-a kl. 59, II-a kl. 22, III-a kl. 22. Prezoj: I-a kl. 80.— sved. kr.

Kiu laboron evitas, bonon ne vidas.

Iam vivis en nia vilaĝo farmisto tiel mallaborema, ke li neniam plugis siajn kampojn pli frue ol kiam tiuj de la najbaroj jam estis semitaj. Li pasigis multan tempon babilante aŭ trinkante en la vilaĝa trinkejo. Dum bona vetero li ofte kuŝis sur la herbejo dormeme rigardante la nubojn; kiam pluvus, li sidis en sia apogseĝo apud la fajro. „Morgaŭ“ ĉiam estis lia amata tago, kaj se li ne havus laboreman edzinon, li estus malriĉa kiel „muso preĝeja“.

Kiam li ekvidis la verdajn grenpintojn kreskantajn en la kampoj de aliaj vilaĝanoj, li pretigis siajn kampojn kaj enmetis la semojn, sed ofte pro la malfrua semado, la varmaj sunradioj velkigis la delikatajn foliojn tuj kiam ili sin montris, kaj duono el la kreskaĵoj perdis pro sekigo. Tiaokaze la prokrastemulo sidigis kaj plendis, ke li estas la plej malfeliĉa homo en la vilaĝo, kaj ke ĉio kontraŭas lin. Kelkfoje lia pacienca edzino riproĉis lin pro lia malfrueco, sed li estis obstina kiel kapro, lin tuŝis nek admono nek ordono, kaj neniam li jesis, ke lia malprospero estas evitebla.

Unu vesperon, kiam li promenis sur la kampoj, komparante siajn sekigintajn rikoltaĵojn kun la prospera pleneco ĉirkaŭe, li tiel forte koleriĝis, ke li ĉiŝiris kun la radikoj kaj amasigis por bruligi ĝin.

Je la krepusko li prenis torĉon kaj enŝovis ĝin en la amasojn, kiuj rapide ekflamis, brulis kaj lumradis tiel brile, ke la farmisto similis al fajroruĝa demono, rastilanta la brulajon. Li estis kunrastanta unu el la amasoj, kiam granda fumnubo levigis el ĝi, bruege krakante, kaj subite

alta flamo eliĝis el la fumo. La neatendita bruego iom timigis lin, tiel ke li ne precize observis tion, kio okazis. Granda estis lia mirego, kiam li aŭdis altovoĉan krieton kvazaŭ el la mezo de la fajro.

Kion li vidis? Tre malgrandan etulon, portantan ruĝan jaketon kaj ruĝan ĉapon kun kvasta pinto! Sur lia eta sulkiginta vizaĝo estis la plej stranga rideto, kiun oni iam vidis. Nu, la farmisto estis tiel mirigita, ke li ne povis eldiri vorton; li nur gratis sian kapon sub la ĉapo, rigardadante la noveveninton per larĝe malfermitaj okuloj.

„Pri kio vi plendis, kiam vi rasis tiun ĉi amason?“ demandis la etulo per alta voĉeto.

„Ĉu vi estas unu el la bonaj feoj?“ siavice demandis la farmisto, ĉar, se vi estas tia, sendube vi scias tion, kion mi diris, kaj ne estas necese respondi.“

„Kion vi diris?“ ree demandis la etulo, kolere frapante la teron per unu el siaj piedetoj.

„Sajnas, ke mi devas danci laŭ via fajfilo,“ murmuris la farmisto, kiu iom timis la feon, „do, mi ĵus volis, ke mi povu sen laboro posedi sufiĉan monon por miaj bezonoj.“ Li iom hontis respondi, ĉar la etulo fikse rigardis lin per siaj brilaj okuloj.

„Ho!“ diris la feo. „Rapide iras la vortoj, sed ne rapide la faroj; de la buŝo ĝis la manoj estas granda interspaco, sed se vi iros en vian domon kaj alportos al mi la fean panbuleton, kiu kuŝas sur via kamenbreto, mi montrus, kie vi povos trovi grandamason da oro.“ Ruĝĉapuleto fingre montris la farmistan domon.

Antaŭ nelonge okazis, ke la laborema farmista edzino promenis laŭlonge de la vojo al la plej proksima urbeto por ĉeesti la festan foiron. Ŝi portis korbojn plenajn je ovoĵoj, pomoĵoj kaj aliaj objektoj por ilin vendi. Survoje ŝi piedfrapis

ŝtonon kaj malsuprenrigardante ŝi vidis, ke la ŝtono estas rondforma kaj sur ĝi troviĝas kruco. Ŝi diris al si mem: „Ho! Sorio donas favoron! Jen ŝtono kun kruco sur ĝi; mi ne mirus, se ĝi estus fea panbuleto.“

Do, ŝi zorge enposigis ĝin, kaj denove ekiris ĝis ŝi alvenis la vendejon. Tie ŝi bone vendis ĉiujn ovojn, spicajn herbojn kaj la ceterajn objektojn je kontentiga prezo, malkare aĉetis kelkajn bezonaĵojn kaj gaje hejmeniris. Palpante la fean bulon en la poŝo, ŝi opiniis, ke ĝi alportis bonanĉon. Alveninte en la domo, ŝi metis la ŝtonon sur la kamenbreton, kaj decidis zorge gardi ĝin ĝis feo venos por peti ĝin, ĉar la vilaĝanoj kredas, ke tiu, kiu trovas fean proprajn okaze de festa tago, rajtas postuli ĉiun ajn de la feo, antaŭ ol redoni la trovitaĵon. Nu, la farmisto kuris al la domo tiel rapide, ke lia edzino, kiu neniam antaŭe vidis ĝin viclecon, opiniis, ke aŭ abelaro persekutas lin aŭ li frenezigis.

Ekvidante ŝin antaŭ la pordo, li ekklaris laŭte: „Kie estas la fea panbulo, kiun vi trovis sur la vojo?“

„Kial vi deziras ĝin?“ ŝi demandis.

„Donu ĝin al mi,“ li diris, „mi ricevos amason da oro, se mi redonos ĝin al feo.“

„Vi havos la oron, kiam estos la „Sankta Neniam“. Ne necesos tre longa ŝtrumpo por konservi ĉiun oron, kiun vi akirus; ĉar vi ĉiam atendas, ke la okazo venu al via nazo“, ŝi respondis, donante al li la ŝtonon.

Nenion plu dirante, li tuj kuregis al la kampo, timante ke la feo malaperos dum lia foresto, sed jen ĝi sidis sur stoplamaso, kantante al si; sed tion, kion ĝi kantis, la farmisto ne povis kompreni.

Kiam la etulo vidis lin, ĝi ĉesis kanti kaj etendis la manetojn, alvoĉe krlante: „Ĉu vi al-

portis al mi, mian panbuleton, kiun mi perdis sur la vojo?“

„Jen ĝi estas“, diris la farmisto, montrante la ŝtonon, „kie estas la oron?“

La feo tuj kaŝis la ŝtonon en siaj manetoj, kaj premis ĝin firme al la brusto.

„Vi ne donis al mi la promesitan monon“, rediris la farmisto.

„Via mono estas kaŝita en via kampo,“ ĝi respondis. „Vi devas plugi kaj rasi kaj fosi frumatene, ĉar matena horo estas plena de oro. Poste vi trovos ĝin. Kiu vivos, tiu vidos.“

Antaŭ ol la farmisto povis diri pluan vorton, alia granda fumnubo eliĝis el la brulanta amaso, kraketante kaj eksplodante bruege. Kiam la fumo malaperis, la feo estis for. Post tiu tago, la farmisto levigis frumatene; li fosis, kaj plugis, kaj replugis, sed neniam li vidis oron aŭ monon en sia kampo.

„Nu“, diris li, „eble estus bone se mi semus la kampon.“ Do, li semis tritikon, kaj printempe, lia kampo estis bela, verda vindindaĵo. Liaj najbaroj miris kaj admiris, sed li diris nenion pri la fea promeso. Kiam venis aŭtuno, li havis plenan fruktorigitan rikolton, kiun li vendis ĉe la foiro je alta prezo, ĉar ĝi estis la plej bona el tiu distrikto.

Li ricevis tiel grandan sumon ke ne estis necese ĉion elspezi; do li donis la reston al sia edzino, kiu plezure metis ĝin en la kufman vilaĝan kaŝejon, malnovan ŝtrumpo.

Post la rikolto, li ree decidis serĉi la fean monon, do pli profunde ol antaŭe li fosis kaj plugis, sed vane — li ne trovis eĉ unu groŝon. Ĝustatempe, li semis hordeon kaj fabojn en la kampo. Dum la somero, la najbaroj ofte venis kaj admiris la belajn rikoltaĵojn; ili tre miregis pri lia ŝanĝiginta konduto. Li jam ne sin apogis sur la kampa pordo, plendante pri la vetero aŭ

II-a kl. 64.— sved. kr., III-a kl. (sen kajuto) 48.— sved. kr. Ĉiuj prezoj sen manĝo.

Estonujo. El Tallinn (Reval) eketuro la ŝipo „Ebha Munk” kaj „Viola” ĉiun mardon, jaŭdon kaj sabaton matene. La vojaĝo daŭras 5 horojn. Prezoj: I-a kl. 160.— fmk., II-a kl. 120.— fmk., sen manĝo.

Danzig. La L. K. K. ne sukcesis lui ŝipon, kiu veturos tra Danzig. La sola vojo por la samideanoj vojaĝantaj tra Danzig estas veturi aŭ fervoje aŭ ŝipe al Stettin kaj de tie uzi la supre anoncitan ŝipon. Inter Danzig kaj Stettin iras la pasaĝerŝipo „Grüssgott” Ties veturprezojn ni nun ne povas sciigi.

Por la linio Antwerpen—Rotterdam—Finlando verŝajne ankaŭ ne estos eble rezervi ŝipon. La samideanoj francaj, belgaj kaj nederlandaj pro tio devas uzi iun el la supre anoncigitaj vojoj. — I-a vojaĝprezoj ĉi tie donitaj estas specialaj rabatprezoj por la partoprenantoj de la XIV-a kongreso. La samideanoj, kiuj deziras uzi ĉi tiujn ŝipojn, devas pri tio informi aŭ al L. K. K. aŭ al la karavangvidantoj en la respektivaj landoj plej malfrue 6 semajnoj antaŭ la eketuro. Ĉe aĉeto de bileto kongresa kartoj estas montrata kiel legitimilo.

2. Reveturo el Finnlando.

Al Hull (ĉiumerkrede, ekz.) „Astrea” merkredon, la 16. VIII., vespere (alveno 21. VII.). Lokoj: I-a kl. 22, II-a kl. 34, III-a kl. 186.

„Arcurus” merkredon, la 23. VIII. (alv. 28. VIII.). En ambaŭ ŝipoj la prezoj estas: I-a kl. 1200.— fmk., II-a kl. 960.— fmk., III-a kl. 480.— fmk., ĉio kun manĝo kaj litoj.

Al Kopenhago (ĉiun 10-an tagon, ekz.) „Oihonna” dimanĉon, la 20. VIII. (alv. 22. VIII.). Prezoj: I-a kl. 720.— fmk., II-a kl. 600.— fmk., III-a kl. 280.— fmk.

Al Stettin (dufoje semajne, ekz.) „Ariadne” sabaton, la 19. VIII. (alv. 21. VIII.). Prezoj samaj kiel la alveturaj.

„Rügen” merkredon, la 16. VIII., (alv. 18. VIII.). Prezoj poste sciigotaj.

Al Lübeck (ĉiusemabate, ekz.) „Aegir” sabaton, la 19. VIII. (alv. 21. VIII.). Lokoj kaj prezoj la samaj kiel por „Mira” (rigardu alveturon). Pri ebla pli granda ŝipo estos poste sciigata.

Al Stockholm el Helsinko (dufoje en semajno, ekz.) „Birger Jarl” merkredon, la 16. VIII. (alv. 17. VIII.), „Torneå” dimanĉon, la 20. VIII. (alv. 21. VIII.). Prezoj: I-a kl. 264.— fmk., II-a kl. 208.— fmk., III-a kl. (sen kajuto) 120.— fmk., ĉiuj sen manĝo.

Al Stockholm (trifoj en semajno) el Turku-Åbo: „Hebe” ĉiumarde, „Nordstjernan” ĉiujauĉe kaj „Heimdall” ĉiusemabate vespere (alv. sekvantan matenon). Prezoj: I-a kl. 240.— fmk., II-a kl. 192.— fmk., III-a kl. (sen kajuto) 120.— fmk., ĉio sen manĝo.

Al Tallinn iros ŝipo ĉiun mardon, jaŭdon kaj sabaton. Prezoj la samaj kiel por alveturo.

Por ĉiuj linioj krom Tallinn, ankaŭ la forveturbiletoj devas esti menditaj plej malfrue 6 semajnojn antaŭ la kongreso.

Ni atentigas la kongresanojn, kiuj eble timetas marvojaĝon, ke Baltika maro estas ĉiuflanke ŝirmata de terpartoj (kontinento, Skandinava duoninsulo, Finnlando) kaj relative profunda, tiel ke forta moviĝo de la maro ĝenerale ne okazas; aparte dum la somero la marvojaĝo al Finnlando estas belega kaj ĝuoplena. — Tute senriska estas la alveturo tra Stokholmo, ĉar densa insularo ĉirkaŭas la tutan vojon inter Stokholmo kaj Turku. Ankaŭ la vojaĝo tra Tallinn estas en tiu rilato rekomendinda. Sed, kiel dirite, la vojaĝo tra Baltika maro estas belega, kaj kiu ĝin ĉirkaŭiras, perdas unu el la plej agrablaj ĝuoj de la kongresvizito.

3. **Pasporto.** La ekstera ministerio konsentis je tio, ke la kongresanoj ricevu la vizon sen formalajoj, kiam ili montras la kongresan karton

kiel legitimilon. Ni atentigas, ke la kongresanoj petu vizon „al Helsinko kaj vojaĝado en tuta Finnlando”, ĉar se ili petas nur vizon al Helsinko, la havigo de vojaĝpermeso por partopreno en ekskursoj kaŭzas perdon de tempo kaj elspezojn. Pri la senformalaja vizo estas sendita ordono al sekvantaj reprezentantoj de Finnlando:

Legacioj: Tallinn, Nunne tänäv 18; Stockholm, Kungsgatan 7; Kristiania, Drammensveien 93; København, Amaliengade 6; Riga, Todlebens bulv. 1 da 2; Berlin, Alsenstrasse 1; Warszawa, Hotel Europe; s'Gravenhage, Javastraat 2; Roma, Corso Vittorio Emanuele 141; Madrid, Hotel Ritz; Bukarest, L'Athénée, Palace Hotel; Washington, Munsey Building room No 1042; Tokio, Tokiofu, Shimo-shibuya, Shinchi 57.

Generalkonsulejoj: London, W. C. 2, 31 Great St. Andrew Street, Shaftesbury Avenue; Paris, IX^e, 3, Rue Nouvelle; Wien, I, Stubbenring 18 II; New York City, 5 State Street.

Konsulejoj: Haparanda; Danzig, Vorstädtischer Graben 44; Zürich, Rüdenschtrasse 5; Sydney, 4 Bridge Street.



Finna Arkitekturo.

Projekto de Alvar Saarinen por la nova Parlamento en Helsinko. **Deksre:** Meza parto (enirejo) de l' Parlamento.

4. **Antaŭkongresa ekskurso trans la polusa cirklo.** Ni informas, ke telegrafvizoro V. Holopainen, antaŭa del de UEA en Kristiinankaupunki, nun loĝas en Petsamo kaj estas preta gvidi kaj helpi la kongresanojn, kiuj preferos alveni tiujn vojojn, turisme grandiozan.

5. **Pri ekskursoj en Finnlando** ni donos novan horaron, konforman al la nova veturplano de la marŝipoj, en venonta komunikilo.

6. **Trapaso.** La L. K. K. turnis sin al diverslandaj Esperantoasocioj petante, ke tiuj sin turnu al siaj registaroj, petante faciligon en la formalajoj de la pasporta vizo kaj en la vagonaroj. Ni esperas, ke ili sukcesos en siaj petoj.

7. **Poŝto kaj telegrafo.** La Poŝta administracio konsentis aranĝi en la kongresejo provizoran poŝtkonton, kie povos esti ricevataj kaj forsendataj simplaj kaj rekomenditaj sendaĵoj. Sur la sendaĵoj desinitaj al tiu poŝtoŝtejo devos esti klare notite „XIV-a Universala Kongreso de Esperanto” kaj preferi la kongresa numero de la adresato. — Telegramoj al kongresanoj povos esti ricevataj en la sama oficejo, se ili estos adresataj al „Esperanto, Helsingfors”. Nomo de kongresano ne estas necesa, se oni notas la kongresan numeron. — La poŝtoŝtejo stampos la elirantan poŝton per aparta stampilo kun teksto „XIV Univ. Kongreso de Esperanto, Helsinko 1922”.

Apogante sin sur la rastilo, la farmisto pensis, pensadis. Fine, li diris al si: „Nu, miaopinie tiu bonuleto estas tute prava. Per pacienca kaj fervora sukcesas ĉiu laboro.”

Originale verkis Emma L. Osmond, London.

Persa legendo.

De Cv. Stajkov.

Granda estis la regno de l' Persa Reĝo: lia flamanta glavo superregis la homaron kaj multajn potenculojn humiligis.

Tre vasta estis lia regno, ĉar Di' Ormuzdo enmanigis al li potencon oracptron por gvidi la homaron kaj — brilegan, diamante ornamitan kronon por la saĝa kapo.

Ekgvidis saĝe la Granda Reĝo gvidate de la bona Di' Ormuzdo. Ekgvidis tiel Ormuzdo la homaron, ĉar potencaj estis liaj saĝo kaj bono.

Sed estis la Arimano ankaŭ Di' Ekenviis Ariman' Ormuzdon kaj ekflamis lia venena kolero kaj li ekserĉis pretekston por venĝo.

Dum tagoj de feliĉa regado Arimano enkapigis al la Potenca Reĝo penson al infere em'... Ja estis Ariman' malbona Di' kaj semis ĉiun malbonaĵon sur la teron!

Kaj kiel vermo, la deziro al tutmonda gloro dismordis la animon de l' tera Potenculo. Vanto rifugis en lian animon. . . li ekvolis gloriĝi tra la tuta mondo. Sulkiginte la frunton por profunda meditado li flere levis la manon kaj diris laŭte:

„Ričan rekompencu mi donos al la geniulo, kiu plenumos la taskon priantanti per sonoraj versoj mian senfinan gloron. Ĉar mi estas la plej granda el ĉiuj gloruloj kaj mian ĉiopovecon ĉiu devas scii. — Multe da oro ricevos tiu, kiu kreas epeon pri la plej potenca el la reĝoj.”

Eksilentis la Reĝo kaj ekatendis.

8. **Afiŝoj.** La kongresaj afiŝoj estas senditaj al ĉiuj de, ni konataj adresoj. Samideanoj kaj esperantemaj firmoj kaj institucioj, kiuj povas elmeti ĝin videble, sendu sian adreson por senpaga ricevo de la afiŝo.


La Loka Kongresa Komitato.

Adreso: Poŝta (ankaŭ por mensesoj) XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinko, Finnlando. **Telegrafa:** Esperanto, Helsingfors.

Ĉu Lingvo Universala estas bezona?

La internaciaj konferencoj donas la respondon. Esperanto aŭ Mezepoka Latino? *De Col. M. E. House* (membro de la Usona delegitaro en Versailles 1918-19).

Ekzistas malmultaj aferoj pli necesaj por pli bona interkompreno inter nacioj kaj por konservado de paco ol universala lingvo por uzado ĉe internacia komerco kaj diplomatio.



Jen unu el la sonĝoj de jarcentoj, interligita kun aliaj sonĝoj: tutmonda senarmigo kaj ligo de nacioj. La militego akcelis la intereson por ĉiuj-ĉi proponoj, kaj planoj por efektiviĝi ilin jam bone progresas. Oni scias, kion oni faras por ilmiĝi la armitecon kaj por ligi la naciojn, sed ne tiom oni aŭdas kaj malmulte oni scias pri tio, kion oni faras por komuna lingvo.

Kvankam la Porpaca Konferenco okazis en Paris, la angla lingvo estis la reganta ĉe la gvidantoj de tiu kunvenintaro. Tion kaŭzis la naturo, ne antaŭpensito, kvankam oni uzis ambaŭ (francan kaj anglan) lingvojn en la intertraktado kaj oficiala protokolo. Por la paco multe faris Usono, Granda Britujo kaj Francujo, ĉar ili estis la regantoj inter la venkintoj, kaj Clémenceau, la granda parolanto de Francujo, sciopovas tiom la anglan kiom la francan; male, la angla estis la sola lingvo, kiun povis paroli la delegitoj de Usono kaj Granda Britujo, escepte kelkaj. Ĉiu, kiu estas bone informita pri tiu konferenco, scias, kiom Orlando, la ĉefministro de Italio, estis malhelpata per sia nekapablo komuniki kun la kundedegitoj anglaj kaj usonaj, escepte per interpretistoj.

En Washington suferis la francoj. Neniu el la estroj de ilia delegitaro kapablis paroli angle, escepte la afabla kaj lerta Jusserand. Oni povas diveni, kiom ili pro tio perdis je prestiĝo; la gravecon de tiu perdo neniu neos. Ĉi tie ankaŭ savis

Kaj ekĝoĝis la kantistoj de la popolo, sed neniu kuraĝis verki la kanton. Ĉar por la Granda Reĝo necesis ankaŭ granda talent'. Dum multaj jaroj atendis la Reĝo la kanton. Longe regardis kaj atendis lia tremema kor'. Lia feliĉo putris ŝarĝate per la turmentanta atendado.

Finfine venis en la palacon nekonata vaganta kantisto kaj dolĉigis la noktojn de la Reĝo per belsonaj neaŭditaj versoj. La nekonata verkisto estis kreinta grandan kanton pri gloro kaj potenco.

Kanton el sepdeksep miloj da versoj. Kanton, en kiu estis kunigita la sankta Harmoni' de mistera Oriento kun la fajra Dir' de Grandaj Dioj!

Sorĉa kaj ebriiga kanto.

Arimano ekĝermigis en la koroj de la Reĝa kantistaro nigran envion. Kaj sangan kalumniĝon oni dissemis tra l' kortego kontraŭ la nova kantisto, kiu gajnis jam la sinceran amon de la Reĝo. Akriĝas la homa epensemo en momento de envio. — Oni diris, ke la kantisto estas forŝtelinta la kanton, — ke la kanto estas kreita de alia pli talenta verkisto.

„Ĉi tiu ordinara homo posedas eĉ ne signon de Grandulo! — Sed la geniulo vera certe estas superhomo!”

Ariman' malhelzigis la prudenton de la Reĝo: Li fdis al la flugantaj diroj kaj forpelis la dian Elektiton el la palacon.

Nur en postaj tagoj la tuta regno daŭrigis ĝuadi la mirindan, ĉielan kanton.

La forpelita bardo — fera kaj senhezita — vagis tra fremdaj landoj kaj kantis himnojn pri misteroj de la multvoja vivo. Kaj ne malbenis li la sorton. Ĉar li sciis, ke estas ebrilga dolĉo

la situation la fakto, ke karnebeek el Nederlando, Schanzer el Italio, Sindhara el Japanlando, Wellington Coo kaj Sze el Hinujo, kaj Barono de Carrier, eble la plej sperta diplomato el ĉiuj, el Belgio, parolas perfekte la anglan.

Tial, kompreneble tiuj du konferencoj sukcesis — ĉe ĉio, kio rilatas al la utiligado de lingvo — nur bonŝance.

Ne nur ĉe internaciaj konferencoj oni bezonas lingvon komunan, ankaŭ ĉe komerco, scienco kaj literaturo. La popoloj de la mondo bezonas pli bonan konon unu de la alia, kaj kapablon komuniki unu kun alia pli libere, kaj tion oni ne povas fari sen komuna esprimilo.

La franca lingvo iam estis evidenta lingvo por ĝenerala internacia komunikado. Sed lingvoj levigas kaj mallevigas, kaj, kvankam la angla povoble devenas la ĉefa lingvo por internacia komunikado antaŭ fino de cento da jaroj, tamen eble alia lingvo forigos ĝin; kaj cento da jaroj, estas tro longa tempo por atendi tiun bezonegan perilon de facila homa interrilato, kaj aliaj movadoj jam estas starigitaj.

Jen prezentiĝas elekto inter Esperanto kaj mezepoka Latino. Ambaŭ havas protagonistojn, kaj por unu aŭ alia oni povas prave argumenti

Esperanto havas la avantaĝon de simpleco kaj libereco de nacia implikiĝo, kaj la Ligo de Nacioj zorgeme enketas ĝian pretendon je prefero. Kian ajn decidon fine alprenos la Ligo de Nacioj, ĝia decido verŝajne definitiveĝos, ĉar ĝi reprezentas efektive preskaŭ ĉiujn aktualajn naciojn, escepte de Ruslando, Germanio, Turkujo, Meksikio kaj Usono.

Kontraŭe mezepoka Latino havas fortajn partianojn, precipe en Italio kaj Usono. Multaj el ni ajn eminentaj edukistoj kredas, ke Latino estas la lingvo plej praktika por alpreni; ĉar jam oni konas kaj instruas ĝin tra la tuta mondo; Esperanto, kontraŭe, devus esti porforte ŝovata en la jam tro plenan lernotajon de la lernejoj. Latino estis uzata dum jarcentoj aŭ pli, kaj iam, en simpla formo, estis la lingvo de la eŭropaj literaturistoj. Hodiaŭ la ŝtatuloj, instruistoj, sciencistoj kaj multaj advokatoj kaj aferistoj, sufiĉe scias de Latino klasika, ke ili povus lerni sen malfacila la lingvon en ĝia simpligita, kaj ĝi estas jam la lingvo parola, skriba kaj registra de la Eklezio de Romo.

Tamen, ĉu Esperanto, ĉu Latino — antaŭen ni, kaj ankoraŭ unufoje progresu en civilizado al la fina celo!

(Aperis en diversaj usonaj gazetoj de 25. jan. 1922. Kopi-ratigita artikolo de Public Ledger Co., Philadelphia, Pa., Usono.)

Traduko de N. W. Frost.

Rim. de Red. Ni ĝojas konstatante, ke eĉ eminentaj ŝtatuloj pli kaj pli ekkonas la bezonon de internacia helplingvo. En la artikolo de kolonelo House nin interesas precipe lia dubo pri la estonte ekskluziva uzado de la angla lingvo kiel universala. Pri la helplingva movado mem, li ŝajne ne estas bone informita, alie li ne povus nur tuŝi Esperanton per kelkaj linioj, dum al Latino tiel simpligita li dediĉas multajn frazojn. Sed li ignoras, ke Latino simpligita unuflanke sufiĉe diferencas de Latino klasika kaj ke la „latinistoj” certe ne estus ĝojigitaj per simpligo t. e. aĉiĝo, de klasika Latino, ke aliflanke la diferenco tamen ne estas tia, ke ĝi ne igus la lernantojn konstante intermiksi Latinon klasikan kaj Latinon simpligitan. Se do la lernotaĵo de la lernejoj estus troa por ankoraŭ enŝovi Esperanton, ĝi ankaŭ estus troa por enŝovi Latinon simpligitan. Cetere, en multaj modernaj lernejoj oni ne plu instruas Latinon, ĉiam pli ĝi fariĝas mortinta lingvo, kiu ankaŭ pro sia antikveco ne plu konformas al la nuntempaj bezonoj, dum Esperanto malrapide sed konstante eniĝas en la modernan vivon kaj per tio fariĝas vere vivanta lingvo.

sia malbona sorto, sed li ne diris la kialon de sia aliĝo, kaj ŝajne li ĝuis la respekton, kiu li gajnis pro la bona rezulto de sia laboremo.

Antaŭe liaj najbaroj malestimis kaj mokis lin, sed nun ili venis por peti konsilon kaj helpon, ĉar sen mono oni estas nulo, kun mono — saĝulo. La pastro elektis lin kiel konsilanton, li portis novajn vestojn kaj ĉeestis regule la diversojn kaj vilaĝajn kunvenojn.

Denove venis la rikoltosezono. Li multe enspezis per la vendado, kaj ne bezonante uzi la tutan sumon, li donis pli ol unufoje al la edzino. Dum tri jaroj li senĉese serĉadis kaj nenion trovis, sed li konstante daŭrigis kaj ŝatis la laboron, kiu jam kondukis al honoro kaj oro.

Nu, unu vesperon, kiam li rastis la stoplon por ĝin bruligi el la amaso, subite elsaltis la sama etulo.

„Bonan vesperon!” ĝenile diris la farmisto, „Ĝis nun mi ne trovis la promesitan trezonon.”

„Vi ne trovis monon en via kampo? Kie vi trovis tiun oron, kiu kuŝas en la edzina ŝtrumpo?” demandis la feo.

„Ho!” li respondis. „Ĝi restis el la mono, kiun mi ricevis per la vendado de miaj rikoltoj, paginte mian lupagon, kaj aliajn elspezojn.”

„Ĉu vi iam donis monon al ŝi, antaŭ ol vi vidis min?”

„Ne, vere neniam”, li diris.

„Kion vi semas, tion vi rikoltos. Bone farita ne estas perdis, kaj mi certigas vin, ke vi multe pli trovos, se vi serĉos sammaniere, kiel vi serĉis ĝin dum la pasintaj tri jaroj. Sen laboro ne venas oro. Kaj ju pli da klopodo, des pli da have.” Tuj la amaso eklumis, kaj la fumo levigis per densaj nuboj. Okazis granda krakado, kaj kiam la farmisto ĉirkaŭrigardis, la feo estis malaperinta.

en la suferad' kaj ke ĝis fundo devas trinki Grandulo la Pokalon!

Multajn jarojn li travivis en serviva deserto sur varma sablaro kantaŭte elegion pri la sovaĝaj nebrideblaj uraganoj.

Post multaj dialogoj kun sia milde vibranta animo dum stelaj glacinoktaj kvietoj — la kantisto mortis en la dezerto solece.

Sablomonto estas lia tombo, kaj neniu konas lian tombon.

Ĉar en solo devas morli Grandulo aŭ sur ŝtipar'. Ĉar nekonata devas esti tombo de Grandul'.

Kaj dum eterno sovaĝa uragano mugas furiozan elegion pri la Granda Kantisto.

Dume en Persujo oni admiris lian kanton. Lia nomo estis tute forgesita sub la polvo de mal dankemo.

Sed . . . la Reĝo estis malfeliĉa en la feliĉo — trioble pli malfeliĉa ol antaŭe. La fantomo de nekonata krimo lin persekutis. La kantistaro fariĝis por li furc'. Lia animo ŝirigis.

Nokte anĝelo aperis en la sendorma dormejo de l' Reĝo kaj diris al li:

„Vi estas viktimo de terura trompo: — vi pereigis Sanktan Homon kaj kune kun li la feliĉon de via regno.”

Kaj ektremis en la sono la Reĝo pro glacia timo. „Maljuston neaŭditan vi faris kaj terurplenaj tagoj atendas vin kaj vian popolon.”

Kaj mikspektigis teruro sanga kun purpura ĝu' en la veniega Reĝa sono.

Enu' senborda kaptis la Reĝon. Li sendis milnombran sklavaron por serĉi la iam amitan kantiston kaj doni al li la promesitan oron.

Sed vane. Tro malfrue

Tro malfrue — dank' al Leĝo!
Nur morto indas laŭri Grandulon.

Internacia Konferenco pri Instruado de Esperanto en Lernejo.

(Genève 18.—20. Aprilo 1922.)

OFICIALA PROGRAMO.

Paska dimanĉo.

- Matene 10 Alveno de la Brita Deleĝitaro.
 Pim 15 Teo en Parko de la Grange kun Geneva grupo „Sielo“.
 18 Diservo en Katedrala Kapelo des Maccabées, St. Pierre.

- Vespere 20.30 Familia akcepto ĉe Virina Ligo por Paco kaj Libereco (Zamenhofa Domo, 6 rue du Vieux-College).

Lundo, 17. aprilo.

- Matene 8 Forveturo per ŝipo, de Jardin Anglais 11.35 Alveno al Ouchy-Lausanne.
 12.30 Tagmarĉo en Hotelo d'Angleterre (haveno).

- Pim 15.15 Reveturo per ŝipo.
 18.17 Alveno al Genève-Pâquis.

- Vespere 20.30 *Familia akcepto ĉe la Domo de l' Etuloj de l' Instituto J. J. Rousseau (9 avenue de Champel, Genève) per Profesoro Pierre Bovet, direktoro de l' Instituto*

Mardo, 18. aprilo.

- Matene 10 *Komeno de la Konferenco, ĉe la Ligo de Nacioj*
 Saluto de la ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj.
 Alparolo de la Direktoro de l' Instituto J. J. Rousseau.
 Fikso de la definitiva programo.
 Prezento (per ĉiu delegitaro) de l' eksperimento farita en sia lando; nur mallonga precizigo pri fakto, loko, dato, nombro, grado kaj oficiala decido.

- Pim. 15 *Labora Kunsido ĉe la Ligo.*
 Logika valoro de Esperanto.
 Helpe al gepatra lingvo.
 Helpe al lerno de fremda lingvo.
 Helpe al studado de klasika lingvo.

- Vespere 20.30 *Publika solena Kunsido en la Universitato.*
 Saluto de s-o Statregisto Mussard, prezidanto de la Fakoj pri Publika Instruado en la Respubliko kaj Kantono de Genève. Paroladoj pri Esperanto en Lernejo.

Merkredo, 19. aprilo.

- Matene 10 *Labora Kunsido ĉe la Ligo.*
 Morala valoro de Esperanto.
 Intereso pri geografio.
 Intereso pri Paco kaj Ligo de Nacioj.
 Internacia korespondado.
 Junula sekcio de la Ruĝa Kruco.

- Pim. 15 *Labora kunsido ĉe la Ligo.*
 Organizado de la Instruado.
 Metodoj.
 Lernotempo.

- Vespere 20.30 *Publika Kunsido en l' Athénée.*
 Diskuto organizita de la Anglo-Geneva Societo. Raportoj (angle) de d-rino Alexandra Fisher kaj Prof. Collinson pri Esperanto en lernejo.

- Nokte 22.15 *Familia akcepto en la salono de l' Athénée per d-ro Edm. Privat.*
Ĵaŭdo, 20. aprilo.
 Matene 10 *Labora Kunsido ĉe la Ligo.*
 Oficiala enkonduko de Esperanto en publika instruado.
 Projekto de akordo interŝtata. Parlamenta agado.
 Pim. 15 *Finfermo de la Konferenco, ĉe la Ligo.*
 Konstantigo de la Komisiono elektita en Praha.
 Decidoj, rezolucioj, deziresprimoj.

- Vespere 20.30 *Publika kunsido ĉe la Universitato.*
 Publika klarigo pri la laboro de la Konferenco.

- * * *
 Akceptejo ĉe Hotelo Richemond, rue Adhémar-Fabri, 4 (apud Monumento Brunsvig).
 Ekspozicio ĉe Instituto J. J. Rousseau, Taconnerie 5.
 Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, 12, Boulevard du Théâtre.
 Informa Oficejo Turista, 3 Place des Bergues.

Imitindaj ekzemploj

por la enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon.

1. La oficejo de la Internacia Foiroj de Reichenberg, Ĉeĥoslovakio ricevis de firmo el Maroko komercajn leteron, en kiuj ĝi aldonante demandas, kial via entrepreno ne uzas Esperanton? Ni faris bonegajn spertojn per ĝi. Estus tre efike kaj helpus ege al nia movado, se ĉiuj firmoj, kiuj jam uzas Esperanton, aldonus ĉi tiun demandon al komercaj leteroj, kiujn oni sendas eksterlandon. (Rim. La Foiro de Reichenberg posedas jam oficialan Esperanto-Fakon.)

2. La Oficejo de la Foiro de Reichenberg respondas al demandoj en naciaj lingvoj per Esperanto, se la demando ne esprimas la deziron ricevi la respondon en ia nacia lingvo kaj se en la urbo estas grupo aŭ deleĝito de UEA. La firmo havas la eblecon tradukigi la respondon kaj ĝi vidas, ke grandaj entreprenoj jam praktike uzas Esperanton. La spertoj estas

bonegaj. La plej multaj korespondantoj eksterlandaj poste respondas per Esperanto. Se la foira kontoro deziras ion de eksterlandano, tiam ĝi kompreneble korespondas per nacia lingvo. Jen du imitindaj ekzemploj elprovitaj, per kiuj la firmoj kaj entreprenoj uzantaj Esperanton bonege povas helpi la disvastigon de la internacia komerca lingvo Esperanto. Prof. inĝ. Scholze.

Okazontaj Esperantaj Kongresoj.

Dum Pasko okazos Sudgermana Esp Kongreso en Salzburg kaj Asocia Kongreso de Germ. Lab. Esp. Asocio en Düsseldorf, okaze de kiu la urba administracio konsentis subvencion de 10000 gmk.

Tuj post Pasko komenciĝos en Genève la grava Konferenco pri Instruado de Esperanto en Lernejoj (vidu oficialan programon!). Ĝia partio-

Larmoj de Kristo.

Sur sangaturita kamp' de batalo,
 Tra vea nebul' de l' lasta ĝem'
 Al orfe mortantaj homoj en valo
 Aperis konsol': la Kristo mem.
 Li venis kun pomp' de sanktaj kvin vundoj,
 Sangantaj eĉ nun por la Homar'.
 Okuloj kun blui' de maraj profundoj
 Prilarmis la sorton de l' idar':

„Mi venis instrui Vin pri la Amo,
 Pri leg' de ĉiel' por homa kor',
 Kuraci la vundojn per la balzamo
 De patra kompaj' por dia glori'.
 Mi venis por savi Vin de l' infero
 Donante sur kruc' min mem al mort',
 Sed vane forĝitis sang' de l' ofero,
 Car vorto de mi restis nur vort'.

Sur sangaturita kamp' de batalo
 Muĝigis la ve' de lasta ĝem',
 Kaj sonis nur rak' de korvoj en valo:
 La kant' de funebra rekviem'.
 Ho, Kristo, mi sentas, se Vi revenus
 Por vivi sur ter', instrui nin,
 La reĝoj, pasrar' denove kunvenus
 Kun pruda humil' — krucumi Vin

prenantojn el nordaj landoj (Nederlando, Britujo, Svedujo ktp.) ni atentigas, ke dum sia reveturo ili havos favoran okazon viziti la kongreson de Rejnlanda-Vesifalia Esp. Ligo (Revelo) en Hagen; kiu prezentos por ili specialan intercon, ĉar ankaŭ ĝi priiraktos la temon „Esperanto kaj Lernejo“. La konata seminaria direktoro d-ro Möbusz el Lübeck faros la ĉefan paroladon. Cetere, ankaŭ en tiu ĉi jaro la Revelo-kongreso ŝajnas fariĝi la plej bone vizitata regiona Esp. kunveno, ĉar la aliĝoj jam superas 330 kaj supozeble atingos 500 (en antaŭa jaro ĉ. 420).

Komercio.

Komerciaj ĉambroj kaj Esperanto.

Dum sia vojaĝo en Ĉeĥoslovakujo kaj Aŭstrujo s-o Cuzon, reprezentinto de la Pariza Foiro, vizitis diversajn komercajn ĉambrojn kaj interigis ilin pri Esperanto. La komercaj ĉambroj de Olomouc, Ĉ. Budejovice, Brno, Hradec Králové, Reichenberg, Salzburg, Innsbruck kaj Vieno (Wien) en oficialaj leteroj dankis lin pro la donita klarigoj kaj sciligis, ke ili akceptas Esperanton por la korespondado. S-o Cuzon vizitis ankaŭ la foirojn de Praha, Reichenberg kaj Lelplzig, en kiuj li konstatis la uzadon de Esperanto kaj renkontis eksterlandajn Esperantistajn komercistojn kaj foirajn oficistojn. Bedaŭrinde la vojaĝo estis interrompata pro la morto de l' patrino de s-o Cuzon.

Framasonio.

Sekve de la kreado de Patronada Esperantista Komitato Framasona ĉe la Francanda Granda Oriento, la du aliaj francaj Obediencoj „Granda Loĝio de Francando“ kaj „Internacia Miksita Ordeno: Le Droit Humain“ aliĝis tiun komitaton. Tio estas favora afero por Esperanto pro la multnombro de la Loĝioj apartenantaj al tiuj tri Obediencoj. Esp. Framasona Kunveno okazos dum la Pentekostaj festoj ĉe la sidejo de la Béziarsaj Loĝioj, kiuj skribis, ke la Esp. framasoniaj kongresanoj estos afable akceptataj de ambaŭ Loĝioj, kiuj kalkulas en siaj vicjoj multajn Esperantistojn.

Laboristaro.

La 4. aprilo okazis en Schatzlar (Bohemlando) propagandaj paroladoj de s-oj Schmidt el Trautenau kaj Mayer el Goldenöls. Sukceso: 2 kursoj kun 70 partoprenantoj; pluaj sekvos. Kursgvadanto: instruisto Hase en Schatzlar.

Pro manko de loko

ni ne povas detale raportii pri diversaj amuzaj kunvenoj en Gablonz (Ĉeĥosl.), Kraków (Pol.), Miskolcz (Hung.) kaj aliloke, nek pri la vizito de gesinjoroj de Villa el Habana (ins. Kuba) ĉe diversaj grupoj okaze de ilia vojaĝo tra Eŭropo; iliaj vizitoj certe multe propagandis ĉie, pruvante la praktikan utilecon de Esperanto kaj precipe de UEA.

Mallongaj Esp. Scigoj.

Francaj delegitoj por Genève.

En la konferenco de Genève partoprenos: Pariza komerca ĉambro per s-oj Baudet, membro (raportinto pri Esp.), kaj Pascalis, eksprezidanto; Centra Oficejo kaj Societo de Amikoj de Esperanto per s-o Deligny, prof. en liceo de St. Omer, kie li, de kelkaj jaroj, instruas duonoficiale Esperanton, kaj f-ino Meyer, instruistino en Paris; Societo Franca por Propagando de Esperanto per s-o Poncet, eksdel. de UEA en Lyon. Ilia kompanio s-o Testud, instruisto en Firminy.

D-ro Nitobe en Kraków.

La 25 marto, okaze de estado de d-ro Nitobe en Kraków, la tieaj Esperantistoj prezentis al li dankon pro lia favora sintenado kaj grava laboro por Esperanto. Laŭ scigo de d-ro Nitobe, nia afero venos sur la tagordon de la kunveno de

De Julio Baghy, Budapest.

Tomaso ja estis hom' pli prudenta
 Kredante post tuŝ' kaj propra vid',
 Judaso ja estis hom' pli pripenta
 Plorante pro krimo de l' perfid'
 Oj Vi, vin nomanta: mondo kristana,
 Uzanta la krucon de l' Dolor'
 Por nova Golgot', krucumo profana
 De miaj doktrin' kaj rememor'!

Vi jetas inferon, gloro milita,
 Animojn de fil' kaj homa frat',
 Sed ve al semant': malamo jeta
 Fruktigos revengon sen kompaj'.
 Pripentu Homar'! Revenu al vojo,
 Montrita de mi por la anm'.
 Al tera ĉiel' de Vero en goĝo
 Al Bono kaj Am' ĝi gvidos Vin!

Ligo de Nacioj en septembro de nuna jaro. D-ro Nitobe tamen konsilis, ke ni ne tro esperu, sed pli laboru.

La kongreso de franca respublikana junularo

voĉdonis la 2. aprilo, laŭ propono de f-ino Meyer, instruistino, rezolucio pri Esperanto en la lernejoj.

En Libera Urbo Fiume

s-o prof. Theodor Kovacs komencis en februaro du kursojn (laboristoj). Jam post unumonata lernado ili ekinterparoladis kaj mendis Esp. ĵurnalojn. Ili estas pli ol 30.

En Korsnäs (Sved.)

s-o Em. Kull gvidas Ĵaŭrgan kurson. Grupo estas fondota.

Hebreoj.

Por fina fondo de Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio (TEHA).

Karaj samideanoj hebreaj ĉiulanda!

Ni turnas nin al vi kun instata peto fine doni vian atenton al fondo de TEHA. Jam antaŭ la milito de ni komencite, la fondo bedaŭrinde pro la milito kaj grandparte pro via malatento ne sukcesis ĝis nun.

Mi do sciligas vin, ke laŭ peto de 5 anoj J. Muĉnik kaj W. Heller mi decidis preni sur min la provizoran gvidadon de la aferoj de Tutmonda Esp. Hebrea Asocio. Mia adreso (sen nomo!): TEHA, ĉe Societo Esperanto, Kraków (Polio), str. Slawkowska 6.

Ĉiu aliĝanto ricevos rondire klarigan leteron venintan de s-ano Muĉnik (en Palestina) Por aliĝi bonvolu tuj sendi vian plenan adreson.

Similan alvokon vi legos en la periodaj gazetoj hebreaj aperantaj en Meza Eŭropo. Por aliaj mondpartoj, precipe por nordaj, anglaj kaj amerikaj ŝtatoj mi petas pri perado.

Leopold Dreher,
 prov. hon. sekr. de TEHA.

Gazetaro.

La Discussion, Habana, 6. 3. (Esp. rubriko, redaktita de H. Zayas Botell.)
 The Times, London, 21. 5. (Int. Lingvo kaj Scienco, favora al Esp.)
 Morning Post, London, 17. 5. (Skeptika artikolo de E. B. Osborn.)
 L'Ere nouvelle, Paris, 5. 4. (Esp. en la kongreso de la respublikana junularo.)
 L'Oeuvre, Paris, 2. 4. (Esp. en Japanujo.)
 Journal du Peuple, Paris, 15. 3. (Poresp. artikolo.)
 Le Journal d'Amiens, 31. 3. (Reprezo de art. de prof. Aulard el „France-Esperanto“.)
 L'Indépendant du Pas-de-Calais, St. Omer, 22. 5. (Favora artikolo.)
 Les Tablettes de l'Aisne, s. s. Laon, 5. 5. (Favora art.)
 La Wallonie, Liège, Belg., 5. 4. (Art. de F. Derigat pri la progresoj de Esp.)
 Le Soir, Bruxelles, 11. 5. (Esp. en la lernejoj, de la Genève-a korespondanto.)
 La Tribune de Genève, 18. 5. (Ĉu oni devas instrui Esp. en lernejoj? Favora art. de Instr. s-o Arago), 22. 5. (Esp. kaj franca lingvo.)

La Suisse, Genève, 21. 5. (Esp. en lernejoj.)

Journal de Genève, 12. 5. (Pri konferenco pri instruado de Esp.)

Courrier de Genève, 15. 5. (Simplaj ideoj; serca art. pri Esp., ldo kaj Latino)

Jura Bernola, St. Imier, 27. 2. (Esp., ldo, Parlamento? Nova lingvo.)

La Revue, Lausanne, 7. 5. (Pri Germ. Esp. Instituto)

Le Droit du Peuple, Lausanne, 17. 5. 30. 5. (Artikoloj de Edm Privat), 4. 4. (Artikolo)

Ingenieur-Zeitung, Cöthen, Germ., 5. 3. (Art. pri Esp. de s-o Wüster.)

Hamburger Echo, 8. 4. (Anonco pri lekcio de Esp. ĉe la teknikaj prelegoj)

Reichenberger Zeitung, 1. 4. (Artikolo pri ŝtata ekzameno por Esp. instruistoj)

Völkerbund, Karlsruhe, 15. 3. kaj 29. 5. (Anoncoj pri ET)

Mededeelingen, Amsterdam, Organo de Ned. As. de Fernkomercistoj, 4. 4. kaj Hout, 7. 4. (Enhavas ambaŭ artikolon pri fandita ligno, laŭ ET; la unua enhavas ankaŭ Esp. lecionon)

Nieuwe Hengelosche Courant, Hengelo, 1. 4. (Priskribo pri ofic. akcepto de reprezentantoj de Brazila Ligo Esp. ĉe la braz. registaro)

Nieuwe Rotterdamse Courant, 25. 5. (Art. pri eltrovo de fandita ligno, laŭ ET.)

L'Echo de Bulgarie, ĉi. francilingva ĵurnalo en Sofia, 18. 2. (Art. de At. D. Atanasov: Esp. en Bulgario.)

Norsk Bokbinder Tidende, Kristiania, 1. 4. (Art. en Esp.)

Nekrologo.

La 14. marto mortis en Valencia (Hispanl.)

S-ano Novejarque Angel,

unu el la plej malnovaj Esperantistoj de tiu urbo, sufiĉe konata al fremduloj, ĉar li multe verkis en revuo „La Suno Hispana“ Kelkaj ilustritaj revuoi hispanaj publikigis lian portreton, ĉar li estis lerta kriptografisto kaj ŝakproblemverkisto.

Korekto.

En la poemo „Venko“ en ET n-o 79 (3-a strofo, 4-a linio) bonvolu legi „perfidaj“ anstataŭ „verfidaj“!

Al niaj abonantoj.

(Aldono al nia peto en n-o 78.)

Ĉiuj legantoj de ET, kiuj ricevas la ĵurnalon banderolita senpere de ni, estas urĝe petataj, pleningi kaj tuj resendi la poŝtkarton aldonitan al la hodiaŭa numero. La kutimoj de adresado estas tiel malsamaj en la diversaj landoj, ke ni ofte ne komprenas la adresojn kaj tial faras erarojn aŭ havas malfacilaĵojn en la registrado aŭ en niaj listoj. Tial nealveno de ET plejofte ne estas nia kulpo, kaj neniam estonte ni postliveros perditan numeron al tiuj abonantoj, kiuj ne resendis la poŝtkarton akurate pleningitan laŭ nia peto. Speciale ni atentigas, ke oni sur la poŝtkarto substreku ilon, kio en la adreso estas nepre necesa, por ke ni ne faru al ni superfluan laboron. Administracio de ET

Recenzejo.

LIBROJ.

LA KARAVANO. De Wilhelm Hauff. El la germana lingvo tradukita J. W. Eggleton. 99 pg. 12 x 18 cm. Dua eldono. 1921. B. E. A. Publications Fund N-o 4. Eldonis Brita Esp. Asocio, London W. C. 1, 17 Hart Street. Prezo: broŝur. 1 s. 8 p. aŭ 8 resp. kup.

Jen vere valora libro. La Karavano, rakontaro konsistanta el ses fabeloj, estas unu el la plej bonaj verkoj de l' germana literatura genio Wilhelm Hauff. Liajn verkojn oni ankoraŭ hodiaŭ legas kun granda ŝuo, kaj ĉi tiun popularecon la aŭtoro de la mondkonataj fabeloj ŝuldas precipe al sia ĉarma arto rakontista. Prezente al la samideanoj amuzaj legaĵoj la tradukinto klopodita atingi kiel eble plej grandan fidelecon al la originalo neniel ŝanĝante la lom malmalmoderna pensa-kaj akribmanierojn de la verkistoj de pasinta jarcento.

Sed li ankaŭ ne pezigis la stilon, kiu estas flua kaj modela. Por komencantoj la traduko eble estas lom malfacile komprenebla; des pli granda estas la ŝuo por perfektaj Esperantistoj, kiuj kverzad promoen en beleaga ĝardeno ornamita per multaj da floroj. Tre malofte prezentigas la beleco kaj la belejoj de nia riĉa lingvo tiagrade, kiel en ĉi tiu maistre farita traduko. Oni rigardu la libron per literaturon ŝatantaj okuloj kaj ne per kritikaj de logikemuloj harojn fendanta. Mi ne volas preterlasi atentigi la legantojn pri la „Enkonduko“ (Fabelo kiel almanako) al la Karavano, kiun la libro de s-o Eggleton bedaŭrinde ne enhavas kaj kies Esperantigo (de Karl Minor) estas presita en „Germana Esperantisto“ n-oj 8. 9 1921.

Estos salutinde, se ankaŭ la dua eldono baldaŭ elcerpigos. (G. Ajul.)

ARTIKOLARO: Von der alten Reichs- und Meßbestadt Frankfurt a. M. Prezo por intereso 10 gmk. kaj sendkostoj. Eldonis Meesami, Frankfurt a. M.

80-paĝa, bele kartaŭnia kalendaro kun interesaj artikoloj kaj multaj ilustraĵoj sur luksa papero.

GAZETOJ.

Esperanto. Aprilo.
 Espero Teozofia. Marto-aprilo.
 Novj Tagiĝo. Marto.
 La Revuo Orienta. Jan. kaj febr.

Aperas en nova aranĝo. Adreso: Tokio, Uŝigome, Sin'oganamaĉi III-14.

Berliner Esperanto-Mittellungen. Aprilo.
 Amerika Esperantisto. Marto.
 Hispana Esperantisto. Febr.
 France-Esp. Aprilo.

Kun 8-paĝa bindebla literatura aldono.
 Literaturo. Jan.-marto.
 La Espero. Marto.
 Esperantida. Marto.
 Suislan Idistio. Aprilo.

Monumenton al D-ro Zamenhof!

Ni intencis eldoni nian hodiaŭan numeron kiel specialan numeron pri resp. por monumento al la Majstro. Sed ni ne sukcesis havigi al ni ĝustatempe la necesajn informojn, artikolojn ktp. Pro tio la speciala numero aperos pli poste, se eble antaŭ Pentekosto.

La 300-jara Jubilea Ekspozicio de Göteborg

okazos dum 1923.

Adreso: Utställningsbyran, Göteborg, Sved. — Oni korespondas en Esperanto.

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau) Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝargas per la dissendo de cirkulojn. Prokurus komercajn adresojn. Prizorgas la anoncadon en Nederlando. Interrelatigas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj. Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

Vin-Barelojn

kaj aliajn barelojn novajn kaj uzitajn, el slovakaj kverko, en ĉiuj grandoj kaj en ĉiu kvanto ofertas je plej malaltaj prezoj David Eckstein, Sereb, Slovakio. Korespondado: Germane kaj Esperante.

SENNACIECA REVUO

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Ilustrita, dekse-dudekpaĝa gazeto, redaktata tute en Esperanto, pri ĉiuj temoj interesaj por la proletaria Esperantistaro. Estas deo kaj samtempa profito por ĉiu klas-konscia Esp. proletario aboni tian belspektan kaj valoran revuon. Aperas monate. Redakcio: 24 Boulevard Beaumarchais, Paris XI. Administracio: 177 Rue de Bagnolet, Paris XX. (Specimeno havebla interŝanĝe de 2 resp.-kuponoj aŭ alio samvalora.)

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 fl., 1 nord. kr., 1 šil., 1 svis. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 3 lir., 7 mk., 8 kc., 25 gmk., 60 hung. kr., 250 pmk., 250 aŭstr. kr., internacieca 5 stamp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonkonto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

FIANCIGO. S-o Liudas Alseika, del. UEA en Dotnava, Litovio, fiancigis kun f-ino Marija Lukoševičaitė.

PANO AL MALSATANTOJ! Kontraŭ ĵurnalo de virinaj aŭ viraj kostumoj kaj paltoj mi promesas liveri 10 fut. da pano al persono, kies adreson la sendanto montras. En Kievo mi liveras panon, ekster ĝi monon laŭ kosto de pano. — Ukrainio, Kievo, Sir. Proreznaja 16/48, Simono Prezenti.

500 ADRESOJ DE JAPANAJ KOLEKTANTOJ de poŝtkartoj ilustritaj, poŝtmarkoj ktp. estas aldonitaj al BES-adresaro (4-a eldono) aperinta en majo 1922. Prezo: 1.60 svia. franko. Sendu bankbiletojn aŭ uzitajn poŝtmarkojn! Por Aŭstrio, Polio, Rusio 50% valorabato. Mendu ĝin tuj, se vi volas certe havi BES-adresaron! Karel Jelinek, Poŝtisto 60, Vinohrady, Ĉeĥoslovakio.

GAZETOJ MALNOVAJ. Bonvolu sendi por mia kolekto la malnovajn gazetojn: Bulteno de Libera Penso, Pedagogia Revuo, Polica Bulteno, Socia Revuo. Le Travailleur Espérantiste, Scienca Revuo, Stenografika Gazeto; al Jozefo Halasz, Agrarbanko, Targu-Mureş, Rumanio.

POR KIA AJN PREZO mi aĉetos la n-ojn 1—12 de ET kaj la marian numeron de „Esperanto“ (UEA) de l'jaro 1921. Adreso: Dezidero Toviassy, Targu-Mureş, Rumanio, Librojo Révész.

LA PLEJ FAMA SONORIL-KONCERTO en la tuta mondo okazos en Mechelen (Malines) apud Antverpeno en Belgujo. Petu informojn de: Inlichtingsbureau (Inform-oficejo), Bruel 125, Mechelen.

KURACIST-VIDVINO akceptos du junajn, klerajn allilandulojn en sia domo. Plena pensiono kaj familia alligo. Bonega muzika kaj lingva instruado en la domo. — S-ino D-ro Hempel, Dresden, Germ., Zoellnerstr. 19.

NUMEROJN 2, 18, 21 kaj 26 de ET mi serĉas kaj petas ĉiun korespondanton al la administracio de ET sub „W.M.B.“ KURSO DE ESPERANTO POR GERMANOJ. Kolekto de „La Esperantisto“, n-o 2. (Einführung in die Völkersprache Esperanto in 10 Stunden.) Prezo 3 gmk. aŭ 1 kc. Havebla ĉe la administracio de „La Esperantisto“ en Wien II, Postamt 34.

Libra kaj Arta Presejo
Emil Friedr. Adolph
Fond. 1888. Hassloch (Palatinato) Telef. 38

Fabrikado de bonkvalitaj aripresaj prospektaj kaj de ĉiuj presaĵoj por komerc kaj industrio en ĉiuj eŭropaj lingvoj, inkluzive Rusa kaj Esperanta

Oni petu oferton.

Korespondado: Esperanto, Anglo, Franco, Germano ktp.

Plej inda memorajo pri la Majstro
estas la memorlibreto:
La lastaj tagoj de D-ro L. L. Zamenhof
Bele kartonita albumo kun teksto kaj poemoj.
Presita sur luksa papero.
Kun multaj ilustraĵoj laŭ originalaj fotoj.
Prezo por ĉiuj landoj inkluzive afranko nur 17 germ. mk.
Abonantoj el bonvalutaj landoj povas ricevi la libreton por la prezo de 2 numeroj de ET; la pagon ni deprenas de la abonkonto; prezo por finnaj kaj ĉeĥoslovakaj abonantoj 3 numeroj de ET.
La prezo altiĝos post 1. majo.
Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“ Herrem bei Köln, Germ.

Komerc kun Britlando.
Se vi volas aĉeti ion el Britlando, mi volonte helpos vin. Mi reprezentas grandajn fabrikojn ĉiusecajn. I. a.:
FORTEPIANOJ.
Harry Heslop, komerca agento, Orrell House, Fairfield, Bury, Lanc.

FIDELECO KAJ ESPER. Himno pri fideleco al Esperanto. Prezo: kanto kaj fortepiano 1 fr. fk. Havebla ĉe l' aŭtoro: S. Frantz, 21, Rue Alain-Chartier, Paris.

SIGELMARKOJN Esperantiĝin. Insignojn, kaŭĉukajn stampilojn por societoj, poŝtkartojn liveras tuj Jozefo Kocourek, gravuristo, Wien IX, Arthaberplatz 3-14. Oni korespondas en lingvoj: ĉeĥa, germana, rusa kaj Esperanta. Postulu specimenaron de Esperantaj sigelmarkoj kontraŭ 2 respond-kuponon.

PASTRO L. W. CRONKHITE, post kvardekjara laboro, eksliĝas sian mision laborkompanon ĉe Bassel, Burma, en trua aprilo, por reiri al sia usona hejmo. Nova adreso: Greenwich, N. Y., U. S. A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua de junio. Li aparte bonvenos leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn montrantaj ĝelfanojn. Responde li sendos leterojn kaj Burmajn kaj Hindiajn kartojn.

ARTAJ INSIGNOJ. „Agradable surprizaĵo pri lia ĉarma aspekto, s-o Poncet, vic-ĉefdel. de UEA en Lyon, varme rekomendas la artajn insignojn de f-ino Ogerard, 9 rue d'Armalille, Paris 17.“

Korespondado kaj Interŝanĝo.
Adalberto Mahler, Budapeŝt VII, Peterfy Sandor u. 58, Interŝanĝo kun seriozaj filatelitoj de ĉiuj landoj. Baza, Michel, Senf, Yvert 21/22. De 1914 ĝis la plej freŝaj noveloj (ĉio nestampita), plue okupaciaj serioj de Baranya, Debrecen, Szeged ktp. Garantiitaj de oficialaj kompetentuloj. Povas sendi. Ne sendas unue. Petas precipe poŝtŝerajn kompletajn novaj-seriojn. Sendajoj malpli ol 200 gmk. aŭ 100 fk. (same fortoŝtoj) ne estas akceptitaj. Informoj. — Sendu registrite! Afranku filatelite!

Alfred Klein, Miskolcz, Hungario, Dayka Gabor utca 1, deziras korespondi pri ĉia temo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj lando. Korespondas Esperante, germane, france.

Dena Fűrth, Miskolcz, Hungario, Vay ut. 7, interŝanĝas poŝtmarkojn. Deziras alajn eŭropajn kontraŭ hungaraj kaj bosnaj valoraj markoj.

F-ino Anna Pechan, Pécs, Felső-malom str. 18, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun eksterlandanoj (bfl.).

S-o Aleksandro Welaz, Zsolczal-kapu 5, Miskolcz, Hungario, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr., papermonojn, gazetojn kaj leterojn (precipe kun turistoj pri turistaj temoj).

S-o E. Van Beughem, instruisto, Paleistraat 140, Antwerpen, Belglando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o J. Sapirŝtejn Gomel, Rusio, poŝtkarto 25, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj Esp. gazetojn.

Ĉarmaj okulfrapaj propagandiloj! Afiŝetoj el Aluminio en verda koloro sur blanka fundo.



Por najli sur la pordon de via magazeno, oficejo, loĝejo (plej efike en okulaliteco super la anslo) Provizaj tekstoj (aliaj en preparo):

„Esperanto parolata!“
„Membro de Universala Esperanto Asocio (UEA).“
„Membro de Germana Esperanto Asocio (GEA).“

Prezoj (en germ. markoj, afrankite):

- Germ., Aŭstr., Luksemb., Okcidenta Pol., Danzig, Memel, Saar: 10 50 100 pecoj 2.60 2.40 2.20 po peco
- Baliko, Bulg., Ĉeĥ., Finl., Hung., Polujo, Ruman., Rus., sudslav. ŝtatoj kaj Turk. 20% a plialtiĝo.
- Ĉiuj aliaj landoj 50% a plialtiĝo.

Sola reprezentado por kelkaj landoj ankoraŭ havebla.
Korespondado eksterlandan nur en Esperanto.
Fritz Mayerhauser, Bad Reichenhall, Germanujo.

Esperanto parolata!

Abonejoj de ET en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34 Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia. Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau. Estona: Est. Esp. Unuigo, postkasti 6, Tallinn. Finna: O/Y. Movado A/B, Kasarminkatu 20, Helsinki. Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clilchy, Paris 9. Hispana: Konrado Doménech, Geron, Rambla Alvarez 12-2. Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajoj-utca 15-II-2, Budapeŝt VI. Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio. Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-vė 12, Kaunas (Kovno). Pola: Adolfo Oberroman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5128). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg. Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj. Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1. U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.



La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondadoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Ĝia abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Grandkomercujo de Bildokadroj Otto Knittel & Cie., Freiburg i. Br. (Germanio) Wenzingerstr. 42.

Importo. Eksporto.

Plej bona aĉetejo por orumitaj kaj poluritaj bildokadroj. Eksporto ĉiulanden. — Oni petu specimenojn kaj prezojn.
Reprezentantoj serĉataj.

HUNGARA VINO.

La unuarangajn vinojn de la Tokaj-Hegyalyja-provinca Vin-Komerca Akcia Societo, Budapeŝt, seriozaj firmoj povas malmultekoste ricevi. Eksporto al ĉiuj landoj de la mondo.
— Botelvinoj. —
Informojn donas
Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt VI, Hajos u. 15.

Kopilibroj de Günter
por skribado kun aĥato aŭ kradono por ĉiuj celoj. Eksporto al ĉiuj landoj. Kapablaj reprezentantoj serĉataj
Emil Günter, Freiburg i. Br. (Germ.), Schillerstr. 54.
Fabriko de kopilibroj.

Inte-Henriko Ĉaĉe, Ventspil (Windau), Latvujto, Puku Ielā 25, instrulisto, sciigas ĉiujn siajn gekorespondantojn pri alveturo el Petrograd kaj petas ilin, bonvole daktigi la interŝanĝadon de leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj; interŝanĝas pri blindaĵoj.

Serioza interŝanĝo. Poŝtmarkserioj, poŝtkartaroj, moneroj. Profesoro José Ventura, 12, Roteros, Valencia (Hispanio), gvidanta Universitatan kurson. Melakceptas bagatelejn. Transdonu lian adreson al ekster-eŭropanoj!

S-o Axel Nordlander, Viktor Eriksson, Valder Odman deziras korespondi kun samideanoj el Aŭstrujo, Germanujo, Francujo kaj Ĥinujo. Adreso nur al urbo Nyland, Svedujo.

S-o J. B. E. de Koster, 98 Dalton Straat, Den Haag, Nederlando, deziras ŝanĝi fotografojn pri sporto, pejzaĝoj aŭ naciaj kostumoj.

Kvar anglaj gesamideanoj deziras interŝanĝadi ilustr. poŝtkartojn kun la tuta mondo:
F-ino S. S. Kilgour, 126 Mortimer Road, London N. W. 10.
S-o T. Glover, 5 Vancouver Road, London S. E. 6.
S-o L. A. Martin, 4 Charlton Lane, London S. E. 7.
S-o R. E. Hoskins, 38 Peacock Street, London S. E. 17.

S-ino Regina Mayer, Timišoara III, str. Tirol 55, Rumanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun la tuta mondo.

Eugen Tyroler, Timišoara I, Schlossgasse 5, Rumanio, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kaj korespondas (pli bone esprimite: ludas) ŝakon kun la tuta mondo.

Mi ne deziras plue interŝanĝi kontraŭ poŝtmarkoj el Germanio kaj Ĉeĥoslovakio. Wiljo Saaristo, Viipuri.

S-o Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergerstr. 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

F-ino Wanda Malewska, Nawrot 7. m. 13, Lodz, Pollando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Edmund Swiderski, Ruda Pabjanicka, Lodz, Pollando, interŝanĝas poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o A. Grimpel, Aseri, Estonio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

Italajn kaj francajn italegajn ĵurnalojn petas L. Fischer, Jaroslaw, Stowackiego 9, Pollando. Rekomence li sendos poŝtmarkojn aŭ polajn kaj germanajn gazetojn.

F-ino Germaine Kenens (16-jara), Schulstraat 57, Antverpeno, Belglando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj kun ĉiuj landoj; interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

Japana studento, s-o Kiyosi Miura, Sin-karasu-Maru, Kasirako 16, Kioto, Jap., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kun ĉiulandaj samideanoj.

S-o Angel St. Nikolov, Lozenec 52, Scfla, Bulgario, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun g-laboristoj, precipe komunistoj de la tuta mondo pri laborista movado kaj teknologio; ŝanĝas poŝtmarkojn kontraŭ maŝinaj katalogoj aŭ libroj en germana aŭ franca lingvoj.

S-o J. Jan kaj August Treilmuth, Tartu, Estonio, Vladimir I. 3 k. 7, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun ĉiuj landoj.

F-ino Hanni Richter, Grottau 584, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun la tuta mondo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Charles G. Stuart-Menteth petas, ke oni ne sendu al li migrantajn kartojn kaj ke li ne interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Ichiro Aoki, 777 chome, Kami-Tsutsui, Kobe, Japanio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun ĉiuj landoj, precipe kun Estonio, Latvio, Litovio, Polio kaj Prusio.

S-o Ernst Streubel, Plauen i. Vogtl, Germ., König-Georg-Strato 54, l., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bfl.).

Kiel membro de bonfarema institucio por libertempa restadejo de malsatit infanoj mi kolektas allandajn poŝtmarkojn. Por bone atingi tiun celon, mi interŝanĝas ilin kontraŭ sampezaj germanaj poŝtmarkoj. S. Schön, Hamburg, Neuer Steinweg 1, Germ.

Kiu sendas al mi 100—200 poŝtmarkojn de sia lando (minimume 50 el kiuj malsamaj) ricevos saman kvanton da germanaj poŝtmarkoj. Walter Amort, Falkenhorst bei Grönau bei Berlin, Waltersdorferstr. 65, Germ.

Por korespond-vespero de finigonta kurso oni petas alsendon de leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj ĝis 1. majo: ĉiu sendeja estas respondata. — Adresu ĉion al s-o R. C. Brake, Köln-Nippes, Germ., Christinastr. 31.

S-o Otto Kummer, juna instruisto, Merseburg a. Saale, Friedrichstr. 14, Germanio, deziras korespondi precipe kun fraŭlinoj.

S-o Willy Wellepp, juna instruisto, Merseburg a. Saale, Haackestr. 2, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj, precipe kun orientaj landoj, kie ankaŭ prefere kun fraŭlinoj.

S-o Rudolf Bierlumpfel, Lauchstedterstr. 45, Merseburg a. Saale, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kun ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj.

S-o Engelbert Schöffel, Plauen i. Vogtl., Germ., Hainstr. 4, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bfl.).